



**FLANDRA
ESPERANTISTO**
MONATLA REVUO
ORGANO DE LA FLANDRA
ESPERANTO
MOVADO

ENHAVO :

La Hungara Problemo. — Dokumentoj por la historio de la Esperanto-movado en Flandrujo. — Flandra Kanto Esperantigita: Sunradieto. — 1830-1930: Funebra Datrevena Festo por la Flandroj. — Esperanto kaj Blinduloj. — 1a Flandra Kongreso de Esperanto. — Flandroj, vekigu! — Kiuj volas disŝiri Grupojn? — Esperanto-Ekzamenoj. — Pri la Milito. — Subteno por nia Revuo. — Flandra Arto. — Inter Ni. — Esperanto door Zelfonderricht: Negende Les. — Bibliografio. — Ricevitaj revuoj.

JARA ABONPREZO : 10 frankoj. — Eksterlando : 3 belgoj.

Tarifo por anoncoj: 1/1 paĝo, fr. 125.—; 1/2 paĝo, fr. 70.—;

1/4 „ , fr. 40.—; 1/6 „ , fr. 30.—;

1/8 „ , fr. 25.—. Perantoj ricevas rabaton.

FLANDRA ESPERANTISTO

Organo de la Flandra Esperanto-Movado

APERAS ĈIUMONATE.

Redaktoro kaj Administranto :

JAN VAN SCHOOR

Julius De Geyterstraat, 149/1, Antwerpen.



Jara abonprezo : 10 frankoj. — Eksterlando : 3 belgoj.
Poŝtĉeko : 1735.09

La Hungara Problemo.

Antaŭ kelkaj jaroj oni ne konis la hungaran problemon, ĉar la homaro, laciĝinte pro la mondmilito jam ne zorgis pri la plendoj, el baseno de la Danubo aŭdiĝintaj: nur pacon ĝi volis, nur pacon kaj ne zorgis pri la detaldemandoj, kvankam tiuj ĉi demandoj signifis multe da homa doloro, mort-barakton de grandan estintecon havanta nacio. Hungarujo estis tiam ĉi tia detaldemando de la „mondpaco.” Oni konis nek ĝian signifon, nek ĝian gravecon. Oni supozis pri Hungarujo, ke ĝi estas korpo tute sensenta, kies teron oni povas dispecigi kaj fordonaci pro militaj „meritoj.” Rumanujo, Ĉeĥoslovakio kaj Jugoslavio el la hungaraj teritorioj iĝis grandaj pro dummilitaj „servoj,” kvankam Rumanujo en 1917 per la bukaresta packontrakto jam antaŭ la fino de la milito perfidis la „entente” ŝtatojn kaj Ĉeĥoslovakio eĉ ne ekzistis. La Ĉeĥoj en armeoj de la „Centraj potencoj” batalis kaj nur en Siberio estis organizitaj la Ĉeĥaj legioj, kiuj nur kontraŭ sendefendaj hungaraj kaj germanaj militkaptitoj „batalis” en neegala rabistmilito, uzintaj la bonan okazon de la rusa revolucio.

Oni paroladas pri „militkulpeco” de Hungarujo. Nun jam estas historia fakto, ke la hungara registaro kontraŭis la militon kaj nur dependanta situacio de Hungarujo rilate al Aŭstrujo kaj la Habsburgoj devigis partopreni en la milito la hungaran nacion kontraŭ sia volo, eĉ kontraŭ sia intereso. Fakte, la hungara armeo, — aŭ hungara parto de la aŭstra-hungara armeo, — brave kaj fide batalis, sed tiu ĉi braveco de la hungara soldato ne estas kulpo sed nacia virto, ĉar la hungara nacio dum miljaro estis soldatnacio kaj neniam ankaŭ en tiu ĉi milito, ĝi kapablis perfidi la flagon sub kiu oni ordonis ĝin batali.

Kelkaj pri memdispona juro de la nacioj paroladis kaj akcentis, ke en grandaj partoj de la antaŭ-milita Hungarujo nehungaraj nacioj loĝis. Laŭ ili oni jure disdonadis tiujn ĉi teritoriojn. Sed tiu ĉi „memdispona juro” en la hungara packontrakto ne valoriĝis, ĉar grandegaj teritorioj, ĉiuj forigitaj teroj de Hungarujo kaj la en ili loĝantaj popoloj tiel estis ceditaj perforte de Hungarujo al aliaj ŝtatoj, kiel ŝakofiguroj sur la ŝakotabulo. Vane estis la protesto de la deputitoj de Hungarujo dum la traktadoj en Trianon; la hungara demando iĝis post la Versailles-a kontrakto nur duaranga demando, kiu ne meritis longan studadon. Oni kompleze plenumis ĉiujn dezirojn de la malamikoj de Hungarujo, sen-pripense dispeciginte tiun ĉi miljaran landon. La hungara nacio estis devigata toleri tion, ĉar du revolucioj, sangaj ombroj de la milionoj da hungaraj soldatoj mortintaj en la milito, kaj milionoj da bajonetoj de la malamikaj najbaroj, profitantoj de la malforteco de la nacio, la tutan landon okupis kaj tute rompis eĉ la eblecon de la perforta kontraŭstaro.

Teritorio de Hungarujo estis antaŭ la packontrakto 325.411 km.2 kaj post la kontrakto 92.833 km.2. La lando perdis dutrionan parton de tuta sia teritorio kaj duonon de la loĝantaro.

Neniam estis diktita pli kruela packontrakto! Hungarujo antaŭ la milito estis unu el la plej riĉaj landoj de Eŭropo. La baseno de la Karpatoj estis tiam UNU lando; la plej perfekta geografia unuaĵo de la mondo, kies dispecigo antaŭpreparis la militon de la estonteco. Hungarujo neniam povas rezigni. Nuntempe jam la tuta mondo konas tiun ĉi problemon, sed oni ne konas, aŭ ne volas koni tiun ĉi jam ne neigeblan fakton, ke la tempo de la perforta eksplodo jam proksima estas.

Pro tio la hungara packontrakto kaj solvo de ties problemoj estas tre urĝa kaj ne detal-problemo de Eŭropo kaj de la mondpaco.

La Trianona packontrakto ne nur tiujn teritoriojn deŝiris de Hungarujo, kie la nehungaroj loĝis, sed kun grava ofendo de la nacieca ideo 3.5 milionoj da hungaroj estis deŝiritaj de sia malnova patrujo. Neniu povas malpermesi, ke tiuj ĉi hungaroj resopiru sian malnovan patrujon.

La tuta mondo devas ekscii, ke en Hungarujo neniam okazis popolvoĉdonado. Al la loĝantaro de la teritorioj, kiujn de la lando oni forigis, neniu demandis al kiu ĝi volas aparteni. Nur UNU popolvoĉdonado okazis en la okcidenthungarlanda Sopron (Oedenburg), kies preskaŭ tute germana loĝantaro, kvankam la germanoj estis plej konsciaj pri sia nacieco, per granda entuziasmo deklaris sian fidelecon al la praa hungara patrujo. Tiu ĉi sola popolvoĉdonado certigas, ke la loĝantaroj de la forŝiritaj teritorioj same estus estintaj fidelaj al Hungarujo.

La hungara nacio grandsignifan rolon ludis kaj ludas en Eŭropo. En duoncirklo de la Karpatoj tiu ĉi nacio antaŭ unu miljaro ekloĝis, kiel plejlasta ondeggo de la popolmigrado. El Azio ĝi venis kaj kun si

ĝi portis sian praan malnovan kulturon, kies naskiĝtero tie estis, ie, sub la grandega ĥina muro, kies kulturon ĝi sukcese miksis kun la Eŭropa kristana kulturo, kiam dum regado de la unua hungara reĝo Sta. Stefano, la nacio akceptis la kristanismon kaj kun tiu ĉi ankaŭ la destinon: defendi la evoluantan kristanan kulturon kontraŭ la orientaj ofendoj.

Hungarujo dum sia miljara ĉi tiea vivado tiun ĉi destinon plenumis. Ĝia historio estas senfina vico de militoj kaj bataloj. Sub defendo de la hungaraj glavoj, en la defendanta ombro de la hungara soldato Michelangelo povis skulpti siajn grandiozajn skulptaĵojn kaj povis pompiĝi la arto de Leonardo da Vinci, Rafael kaj Tizian. Sub la defendo de la hungara brusto la febro de la Renesanco povis libere kaj feliĉe inspiri la homan genion. Sub defendo de la hungaraj herooj kaj martiroj pacaj flandraj kaj italaj majstroj povis skulpti siajn „ŝtonpunto-poemojn.”

La okcidenta kulturo ĉi tiel forte neniam povus esti evoluinta, se la hungaraj glavoj ne estus certigintaj la pacon de Eŭropo sur la ŝtonmuregoj de la Karpatoj.

La paganaj popoloj, kiuj en la Oriento la kristanismon ofendis, ĉiuj de la hungararo estis parenpopoloj, kiuj kore estus federaciigintaj kun la parencaj hungaroj. Hungarujo nun sur ruinoj de la kristana kulturo povus esti la plej potenca ŝtato, se ĝi tiam estus perfidinta sian kredon. Kontraŭ siaj parenpopoloj ĝi defendis per sia korpo la okcidentan kristanan kulturon. La okcidentaj popoloj neniam estis pro tio dankemaj.

El dum la turkaj tartaraj invazioj detruitaj teritorioj, la hungaraj reĝoj fremdulojn permesis enmigri. Kun sincera gastamo ili akceptis la kroatojn, slovenojn, serbojn, rumanojn, el iliaj patrujoj de la turkoj persekutitaj, kaj tiu ĉi gastameco tion rezultigis, ke la gastoj nun forabis de ni tiujn teritoriojn, en kiuj la hungara nobleco permesis al ili loĝi.

Post sangaj bataloj kaj malgraŭ multege da hom-ofero Hungarujo ĉiam reviviĝis. Ĉiu hungaro scias, ke ankaŭ la kontrakto de Trianon ne kreis definitivan staton, ĉar kiel Mussolini diris: „neniu packontrakto povas esti tombejo de iu nacio”! Ankaŭ tiu ĉi malgaja sorto de Hungarujo devas foriĝi kaj devas veni la hungara reviviĝo.

La „Hungara Kredo” tiel diras:

„Mi kredas je unu Dio,

„Mi kredas je unu patrujo,

„Mi kredas je unu eterna dia justeco,

„Mi kredas je la reviviĝo de Hungarujo!

„Amen.”

PUSTKAS ISTVAN, *Budapest.*

Dokumentoj por la historio de la Esperanto-movado en Flandrujo

Por ke tiu, kiu iam skribos la historion de la Esperanto-movado en Flandrujo, estu bone informata, ni represas artikolon, kiu aperis en "Het Laatste Nieuws", de la 11a. de Junio 1924. Al tiu gazeto oni ja ne povas riproĉi ekstremismon! Ni represas la flandran tekston, por ke oni ne kulpigu nin je trograndiga traduko. Do jen la artikolo:

"Fransch parleerende Esperantisten.

"Zondag, 8 Juni, had hier ter stede, het jaarlijksch kongres plaats der Belgische Esperantisten.

"De Kongresleden werden op het stadhuis, in naam van het gemeentebestuur, door den heer De Schepper, schepenen, verwelkomd.

"Mej. Th., voorzister der groep van Brugge stelde de kongresisten voor, en bedankte het stadsbestuur, om de eer dezer officieele ontvangst.

"Deze toespraak werd in het Fransch gehouden, waarop de heer schepenen in dezelfde taal de welkomrede hield.

"Daarna nam de heer Witteryck, algemeen voorzitter der "Belga Ligo Esperantista" het woord, weder in het Fransch, om den dank der Belgische Esperantisten te betuigen.

"Dat zijn dus drie geboren Bruggelingen die hun moedertaal te minderwaardig achten, om ze op het stadhuis onzer vlaamsche stad Brugge te laten weerklinken; hetgeen een pijnlijken indruk moet verwekken, zoowel bij de bevolking als bij de talrijke Vlaamsche Esperantisten die er tegenwoordig waren.

Wij meenen dat deze verkeerde handelwijze te betreuren is en niet strookt met de strekking, die het gebruik van het Esperanto, als algemeene hulpwereldtaal beoogt en die geen taalstrijd mag in het leven roepen. De taal van het volk vernederen, is dat volk in zijn eergevoel kwetsen, zijn ziel aantasten."

Jen la esperanta traduko:

"Francan parolaĉantaj Esperantistoj.

"Dimanĉon, 8an. de Junio, okazis ĉi urbe la ĉiujara kongreso de la belgaj Esperantistoj.

"La kongresanoj estis bonvenataj en la urbodomo en la nomo de la urbeŝtaro de s-ro De Schepper, skabeno.

"Fino Th., prezidantino de la bruĝa grupo, prezentis la kon-

gresistojn kaj dankis la urbestaron pro la honoro de tiu oficiala akcepto.

“Ĉi tiu parolado estis farata franclingve, post kiu la s-ro skabeno faris la bonvenan paroladon en la sama lingvo.

“Poste ekparolis s-ro Witteryck, ĝenerala prezidanto de “Belga Ligo Esperantista”, denove franclingve, por esprimi la dankon de la belgaj esperantistoj.

“Jen do tri naskitaj Bruĝanoj, kiuj juĝas sian gepatran lingvon tro vulgara, por resonigi ĝin en la urbodomo de nia flandra urbo Bruĝo; kio devas fari malbonan impreson tiel bone ĉe la loĝantaro kiel ĉe la multnombraj flandraj esperantistoj, kiuj ĉeestis.

“Ni opinias, ke ĉi tiu malbona agmaniero estas bedaŭrinda kaj ne harmonias kun la celo, kiun oni per la uzado de Esperanto kiel ĝenerala mondhelplingvo volas atingi kaj kiu ne povas vivigi lingvan luktadon. Humiligi la lingvon de l' popolo, estas vundi la honorsenton de tiu popolo, ataki ĝian animon.”

La flandraj esperantistoj scias, ke tiu artikolo efikis kiel veko en dezerto.

En la sama gazeto “Het Laatste Nieuws” de la 23a. de Majo 1929 aperis ankoraŭ la sekvonta artikolo:

“Voor meer rasfierheid.

“De Belga Ligo Esperantista, houdt haar jaarlijksche kongressen beurtelings in Wallonië en in Vlaanderen. Op Zondag 19 dezer, werden de kongressisten officieel ten stadhuize te Gent ontvangen, en verwelkomd door den heer burgemeester Van der Stegen.

“Het ware niet meer dan billijk geweest, daar het kongres in het hartje van Vlaanderen plaats had, en de overgroote meerderheid van de deelnemers Vlamingen waren, dat de voorstelling van de kongressisten in het Nederlandsch ware geschied, maar neen, alles gebeurde in het Fransch.

“De leiders van de Belga Ligo, wien het ofwel mangelt aan voldoende kennis van onze taal, ofwel aan voldoende stambewustzijn en rasfierheid om hun eigen taal niet als asschepoester in eigen landstreek te laten behandelen, hebben hieraan schuld.

“Te Mechelen, te Brugge, deed zich hetzelfde betreurenswaardig feit voor, tot groot misnoegen van de Vlaamsche esperantisten. Wij wenschen geen taalstrijd te zien voeren in ons midden, maar zullen dien toestand niet verder dulden, te meer, daar de Vlaamsche pers steeds bereidwillig de propaganda wil steunen voor de Esperantobeweging. Dit weze eens en voor goed gezegd, aan de aan hun plicht tekort komende leiders, door de talrijke misnoegde Vlaamsche Esperantisten, deelnemers aan het kongres. RASFIERULO.”

Esperante :

“*Por pli da Rasfiero.*”

“La Belga Ligo Esperantista organizas siajn ĉiujarajn kongresojn laŭvice en Valonujo kaj en Flandrujo. Dimanĉe la 19an. nunan, la kongresistoj estis oficiale akceptataj en la urbodomo de Gento kaj bonvenataj de s-ro urbestro Van der Stegen.

“Estus nur estinta justa, ĉar la kongreso okazis meze de Flandrujo kaj la grandega multnombro de la partoprenantoj estis Flandroj, se la prezentado de la kongresistoj estus okazinta nederlande, sed ne, ĉio okazis france.

“La gvidantoj de la Belga Ligo, al kiu mankas ĉu sufiĉa kono de nia lingvo, ĉu sufiĉa gentkonscio kaj rasfiero por ne pritraktigi sian propran lingvon kiel cindrulinon en propra lando, estas kulpaj je tio.

“En Mehleno, en Bruĝo, la sama bedaŭrinda fakto okazis, je l' granda malkontenteco de la flandraj esperantistoj. Ni ne deziras fari lingvan luktadon en nia medio, sed ne pli longe toleros tiun situacion, despli ĉar la flandra gazetaro ĉiam bonvole apogas la propagandon por la esperanto-movado. Ĉi tio estas nun por ĉiam dirata al la ne sian devon plenumantaj gvidantoj de la multnombraj flandraj esperantistoj, partoprenintoj al la kongreso. — *Rasfierulo.*”

Post ĉi tiuj sekvos ankoraŭ aliaj dokumentoj por la historio de la Esperanto-movado en Flandrujo.

Tro da flandraj esperantistoj ne jam scias kiel la Belga Ligo-estraranoj ridis pro la devizo, kiu devas esti tiu de ĉiu vera esperantisto :

UNUA LINGVO : LA GEPATRA,

DUA LINGVO : ESPERANTO.

Flandra Kanto Esperantigita SUNRADIETO.

Teksto de H. VAN ROOY.

En malgranda sia lito
Kuŝis knab' kun malesper';
Estis tiel malagrabla
Dum malhela pluvveter'.

Estis ĉirkaŭ li silente ;
Panjo estis nur ĵus for...
Sur lia ĉemiz' ruliĝis
Du larmetoj de dolor'.

Muziko de ALFONS SCHREY.

Vidu, jen ! tra l' nigraj nuboj
Boras ora sunradi' ;
Tra l' malgranda fenestreto
Gaje ŝtelrigardas ĝi.

Sur vizaĝ' de l' knab' ekbrilis
Ruĝo kaj feliĉo nun.
Kiam ekdormetis knabo
Dolĉe resubiĝis sun'...

Tradukis MARTHA VERVLOET.

1830 - 1930.

Funebra Datrevena Festo por la Flandroj.

C. — EN LA ARMEO.

- 1830 Ĉiuj komandantoj de la armeo estas Francoj: Desgaltès, Grégoire, Bouchez, Parent, Mellinet, de Culhat.
- 1831 Militestroj por Orient- kaj Okcident-Flandrujo: Niellon; — por Antverpeno: Magnan; — por Luksemburgo: Hurel; — por Lieĝo: Chazal. Direktoro de la militlernejo: Chapelié.
- 1830 Dekreto de la Provizora Registaro — la 16an. de Oktobro —: „La franca lingvo estos la ununura komando-lingvo en la armeo.” Ankaŭ la Administrado, Militkonsilantaroj, k.t.p., estas ekskluzive francaj. La flandraj soldatoj nomas tiun sistemon: „La valona incitado!”
- 1884 La holanda Kapitano, J. de Petit, skribas, raportante pri studvojaĝo al Antverpeno, Gento kaj Lieĝo, ke restas al li enigmo, kiel la belgaj oficiroj, preskaŭ ĉiuj nesciantaj la flandran, povas komprenigi kaj obeigi sin de siaj flandraj soldatoj (65% de la armeo).
- 1892 La Militkortumo en Bruselo malpermesas ĉiun flandran proceduron kaj la Kasacia Kortumo sankcias tiun vidpunkton, malpermesante al Advokato Adolf Pauwels, pledi nederlande por la francan nescianta soldato.
- 1896 En la Militedukejo povas, por la unua jaro, „se necese” ekzisti flandra sekcio, kun maksimume 4 burĝaj instruistoj... Ekzistas tamen vasta franclingva instruprogramo. En la 2a., 3a., 4a. studjaro ĉio estas ekskluzive franca. La estrado estas nur franca.
- 1907 En la oficirlernejo en Namuro ĉio estas franca. En la regimentlernejoj kaj vesperkursoj la sistemo estas francigi kiel eble plej baldaŭ la flandran parolantajn knabojn.
- 1909 El la „Vlaamsche Gazet” (de la 23a. de Marto): „Inter 19 infanteriregimentoj estis unu, kie estis donataj kelkaj lecionoj flandra-lingve.”
- 1909 Militkuracisto, vizitante la Gentan hospitalon, alparolas Bruĝan soldaton kaj kiam tiu lin ne komprenas, li laŭte diras franclingve: „Ankoraŭ idioto, kiu ne komprenas la francan!” kaj lasas la flandran kompatindulon sen helpo, kun grava, doloriga krurvundo.
- 1910 „En Bruselo estis inter 131 oficiroj, 94 la flandran nesciantaj, en Namuro inter 50 oficiroj 39 Valonoj.” (El flugfolio „Aan het Vlaamsche Volk,” Aprilo 1916.)

- 1912 La valona kapitano Guillemin disŝiras 60 petskribojn por liber-tempo ĉar ĉi tiu dulingve redaktitaj presaĵoj estis enskribitaj nederlande.
- 1914 En la milithospitalo de la bonege flandra Antverpeno estas ankoraŭ 12 la flandran nesciantaj kuracistoj, t.e. pli ol la duono.
- 1914 La 5an. de Aŭgusto. Reĝo Albert, en proklamo al la soldatoj: „Flandroj! Rememoru la Batalon de la Oraj Spronoj!”
La 22an. de Aŭgusto. El „La Métropole”: „Ni ne plu volas rememoron de la Batalo de la Oraj Spronoj.”
- 1915 El sekreta flugfolio: „La Belga Politiko post la Krizo: „La starigo de flandra Universitato kaj la aranĝoj por devigi la oficir-ojn lerni la nederlandan, devas esti nerevokeble forigataj.”
- 1915 D-ro Van de Perre skribis la 12an. de novembro en la „Stem uit België,” aperanta en Londono:
„Kompetentaj aŭtoritatoj, kun kiuj mi parolis pri la armeo, pretendas, ke nia armeo konsistas el 75 ĝis 80% da Flandroj, el kiuj 60% nur parolas flandre. Nu, dum ĉi tiu milito, la aŭto-ritato sisteme agis kvazaŭ la flandra popolo ne ekzistas kaj kvazaŭ ĝi ne havas aŭ povas havi rajtojn.”
Kelkaj ekzemploj skizantaj la flandran malamantan spiriton en la belga batalarmeo (80% da Flandroj).
- 1916 El „Vlaanderens Weezang aan den IJzer”:
Komandanto Jacobi: „Favorante la flandran, oni favoras la ger-manan spionadon. Sen la Flandroj neniam estus ekzistintaj per-fiduloj.”
Kolonelo Mahieu: „Ne estas honto esti flandremulo; estas infekto kaj post la milito ni mortpafos ilin ĉiujn.”
Majoro Poulain: „Sendu almenaŭ unu al mi, kiu parolas civilizitan lingvon kaj ne negran. La flandra estas bona por la sovaĝuloj.”
Komandanto Semal: „Oni tradukos flandre, se vi estas tro stultaj por kompreni la francan. Vi kondutas kiel porkoj! Reiru al via malpura kaj naŭza Flandrujo!”
Generalo Bernheim: „La unua, kiu ankoraŭ parolos pri flandrem-eco, estos punata; la oficiojn mi rompos, la soldatojn mi pied-frapos al la punkompanioj.”
- 1917 El interparolado inter belgaj oficioj en militlernejo en Gaillon apud Rouen, dum la milito. „Vlaamsche Nieuws”: „Sed kiel vi kapablas komandi la flandrajn soldatojn, se vi ne komprenas ilian lingvon?” Respondo de la valona leŭtenanto Lossaux: „Mi havas mian revolveron por obeigi min!”

(Daŭrigota).

Esperanto kaj Blinduloj

Jen mallonga skizo pri la Esperanto-movado inter blinduloj.

La gvidanto de la movado estas Harold Thilander, blinda kaj surda, redaktoro kaj eldonanto de diversaj revuoj en brajlo, inter kiuj "Esperanto-Ligilo."

Malgraŭ siaj kriplaĵoj kaj nekuracebleco, li sentis en si nerezisteblan puŝon ekutili por siaj blindaj fratoj. Dank' al bonvolemo de vidanta amiko, li prenis sur sin la pezan taskon pik-skribi francan gramatikon en brajlo (interrompita kaj ne finita laboro), poste anglan gramatikon kaj vortaron (20 volumoj), intencante tiamaniere utili al porblindulaj revuoj kaj aliaj eldonaĵoj en tiuj lingvoj. Li verkis ankoraŭ francan gramatikon kaj vortaron, teknikajn kaj sciencajn verkojn, germanan gramatikon, k. t. p.

Unua klopodo por gajni lian simpatian por Esperanto malsukcesis en 1899, ĉar li iom malesperis pri la afero post la malsukceso de Volapük. Li provis uzi la latinan kiel internacia lingvo por blinduloj.

Tamen iun tagon amiko de li prelegis kelkajn versojn en lingvo nekonata de li :

"En la mondon venis nova sento,
Tra la mondo iras forta voko,
Per flugiloj de facila vento
Nun de loko flugu ĝi al loko..."

Li komprenis la tekston kaj admiris la sonriĉecon. Li opiniis, ke estis itala, tamen estis Esperanto.

Tio donis al li tre profundan impreson kaj naskigis longan priensadon.

De tiam datumas la Esperanto-movado inter blinduloj. Thilander ne ripozis kaj baldaŭ aperis en "Progress" (angla porblindula revuo) leteron de li pri Esperanto. Li interkonatiĝis tuj kun gvidantoj el la Esperanto-movado. El ili ni citas speciale prof. Th. Cart, fondinton de Esperanto-Ligilo en 1904.

Tiamaniere la movado ekmarŝis. Jam ĉe la IIIa Internacia Kongreso de Esperanto, diversaj blindaj samideanoj ĉeestis kaj aranĝis apartan kunvenon (Cambridge 1907).

Iom post iom la movado plivastiĝis kaj ĉe la blindul-kongreso en Napoli, kie formortinta Frato Isidoro de la Porblindula Instituto de Woluwe (apud Bruselo) donis informojn pri Esperanto, nia lingvo estis proklamata kiel tre valora rimedo por plibonigi la situacion de la blinduloj kaj oni esprimis deziron eklerni ĝin en la porblindulaj institutoj. Woluwe donis la ekzemplon kaj nun ĉiam ankoraŭ Frato Ludoviko

gvidas tie Esperanto-kurson. Ankaŭ ankoraŭ ĉiam ekzistas la Esperanto-grupo "Lumc en Mano", fondita de Frato Isidoro (Porblindula Instituto de St Lambrechts Woluwe).

Ni devas ankaŭ citi la belan agon de la "National Institute for the Blind" en Londono, kiu en 1919, sekve al propono de Sir Arthur Person, voĉdonis £ 250 por subteni "Esperanto-Ligilo", n. Aliaj institutoj kaj porblindulaj asocioj sekvis tiun ekzemplon, ĉar estas precipe dank' al tiu internacia malavareco, ke "Esperanto Ligilo" ĉiunmonate ĝojigas siajn 750 abonantojn kaj milojn da legant'oj en la mondo kaj havigas al ili kuraĝigan legaĵon.

Kun ĝojo ni rimarkis, ke unu el niaj ĉefaj blindulinstitutoj kunhelpas per jara subteno la daŭrigadon de tiu bela entrepreno. Ke tiu ekzemplo instigu pliajn el niaj Institutoj agi sammaniere.

La milito.... jes, ankaŭ ĝi interrompis la eldonadon de la revuo, kiu nur en 1919 reaparis kun tri numeroj.

Intertempe plivastiĝis inter la legantoj kunlaboremo kaj unanimeco kaj senhezite ili kunvokis la unuan internacian kongreson de blindaj Esperantistoj en Praha. (Samtempe kun la ĉiujara kongreso de la Esperantistoj-vidantoj).

Tiam sekvis la 2a kongreso en Helsinki-Finlando (1922), la 3a en Nürnberg (1923), la 4a en Wien (1924), la 5a en Edinburgh (1926), la 6a en Dantzig (1927) kaj la 7a en Antwerpen (1928).

Ĉe la 2a kongreso en Helsinki oni metis la fundamentojn por internacia ligo, kiu estis definitive starigata en Nürnberg sub la nomo de Universala Asocio de Blindaj Esperantistoj (U. A. B. E.)

Tiu asocio elektis kiel organon "Esperanta Ligilo" por siaj blindaj membroj kaj eldonis samtempe revuon en nigra presaĵo: "Ligilo por Vidantoj" celante alproksimigi vidantojn al blinduloj.

El "Algemeen Blindenverbond van Vlaanderen".

(Ĝenerala Blindulasocio de Flandrujo).

Tradukis POL VARENS.



1a FLANDRA KONGRESO DE ESPERANTO

Antverpeno, 7an-8an-9an de Junio 1930.

Honora Prezidanto: S-ro Frans Van Cauwelaert, urbestro.

Laŭ la nombro de la ĝis nun ricevitaĵoj aliĝiloj ni rajte povas konjekteti, ke nia kongreso iĝos unu el la plej multnombre vizitataj kongresoj. Multaj neflandraj samideanoj ankaŭ ĉeestis: francoj, anglo, nederlandanoj, germanoj, hungaroj, ruso, jam aliĝis.

Por plifaciligi la laboron de la kongresa oficejo vi sendu kiel eble plej baldaŭ vian aliĝilon.

Memoru, ke la partoprenantoj de nia kongreso ĝuos fervojan rabaton de 35 % kaj ke la sekretariino de la L. K. K., F-ino Martha Vervloet, Gravinstraat, 32, Borgerhout-Antwerpen, volonte havigos al vi ĉiujn deziritajn informojn.

La provizoran programon vi povas trovi en nia antaŭa numero.

Ni tamen povas jam aldoni, ke la kunveno de la kongresanoj okazos en la Reĝa Ateneo, Victorieplaats (la kongresejo de la 7a. Universala Kongreso). La urbeŝtraro decidis, ke ni povas disponi pri tiu salono.

La estro de la Urba Navigacia Muzeo, s-ro Em. Beuckeleers-Donche, akceptos lunde matene la kongresanojn en la muzeo kaj persone ilin gvidos.

La definitiva programo aperos en nia sekvonta numero.

Flandraj esperantistoj, en Antverpeno oni ne kondukos kun vi kiel kun fremduloj; vi sentos vin hejmaj, vi estos inter duoblaj samideanoj!

La devo de flandra esperantisto estas aliĝi al flandra kongreso!

FLANDROJ, VEKIĜU!

En la jaroj forpasintaj
kun kuraĝo sen kompar',
bravaj Flandroj bataladis
por la land' kaj la homar';
sed ni ne plu bataladas
kun armiloj de la mort',
sed paceme kontraŭstaras
ĉiun baton de la sort'.

Kaj nun nova malamiko
vigle staras inter ni,
minacante nian lingvon,
perfidanto de l' naci'.
La novaĵo disflugadis;
ĉiuj ni en plen-akord'
kriis, dum la fingro montris:
"jen la vojo al la pord'!"

Ho vi, pacaj batalantoj,
laciĝintaj pro labor',
nun forpelu ĉiun zorgon
en ĉi tiu ĝoja hor';
ĉar ni festas Esperanton
en tut-plena harmoni';
do, aŭdigu ni la kanton
de la paca batal-kri'!

REKANTAĴO:

Marŝu, marŝu ni antaŭen,
kunigitaj venkos ni!
Pace, firme, ne laciĝu,
jen la flandra batal-kri'!

Homoto.

KIUJ VOLAS DIŜŜIRI GRUPOJN ?

Oni scias, ke la Sta. Nikolaa grupo "Al Triumfo" decidis ekŝiĝi el la Belga Ligo. Tiu decido estis unuanima kaj tute ne kaŭzis disiĝon en la grupo.

Tamen la Belga Ligo, ne avertinte la grupan estraron, kunvokis siaflanke la membrojn de "Al Triumfo" por savi tion, kio estus ankoraŭ savebla.

S-roj Schoofs kaj Petiau reprezentis la Belgan Ligon; multaj fidelaj membroj ĉeestis kaj ankaŭ nia amiko, kaj membro de nia grupo, Jan Van Schoor el Antverpeno.

La rezultato de la diskutado estis, ke ĉiuj ĉeestantaj membroj per firma "jes" ĉiu aparte deklaris, ke ili aprobis la ekŝiĝon de la grupo el la Belga Ligo.

Ni notu, ke s-ro Van Schoor inde kaj fakte debatis, dum la prezidanto de la Belga Ligo... Kvankam li senegale estras esperanton, li — elŝutante sian koleron sur la sekretario de "Al Triumfo" — uzis flandran insultan vorton...

La 16a. de Februaro estis por Belga Ligo terura tago de malvenko!

La sinjoroj tamen ne ripozas! Ili volas semi malpacon inter la samideanoj en nia urbo kaj jam pli ol unufoje klopodis fondi novan grupon en Sta. Nikolao. Ĝis nun tamen sensukcese!

El ĉio tio klare montriĝas, kiuj volas diŝŝiri grupojn! La aliaj grupoj atentu kaj se ili volas aŭdi la du sonorilojn kaj ion lerni, ili organizu debaton inter la redaktoroj de Belga kaj Flandra Esperantisto!

MAX.

ESPERANTO-EKZAMENOJ.

La 25an. de Majo okazos en Antverpeno *Esperanto-ekzamenoj pri simpla kaj perfekta kapableco*, organizitaj de la *Flandra Esperanto-Instituto*.

La partoprenontoj de tiuj ekzamenoj devas pagi la sumon de dek frankoj al la supre citita Instituto (poŝtĉeko 2427.03).

La diplomdisdonado al la sukcesintoj okazos dum la 1a. Flandra Kongreso de Esperanto en Antverpeno je Pentekosto.

La juĝantaro konsistas el s-roj Jan Jacobs, lingva profesoro; H. Michiels, ŝtata kantona inspektoro de instruado; J. Karnas, lingva profesoro; f-ino M. Vervloet kaj s-ro J. Van Schoor asistos kiel reprezentantoj de Flandra Esperanto-Instituto.

Por ĉiuj informoj oni sin turnu al la sekretariino de Flandra Esperanto-Instituto: f-ino Martha Vervloet, Gravinstraat, 32, Borgerhout-Antwerpen.

Pri la Milito

... Tamen, en tiu batalo, ne troviĝis cent homoj sciantaj pro kia kialo ili batalis, kaj inter la venkintoj ne estis cent homoj kapablaj por klarigi la sensecajn ĝojojn, kiujn naskigis en ili la Venko. Inter ili ne troviĝis kvindek al kiuj ĝi alportis profiton. Nunmomente oni ne trovas, inter la vivantoj, ses interkonsentantaj pri la kaŭzoj kaj la rezultoj de tiu afero. Unuvorte neniu iam sciis ion certan pri tio. Estas nur tiuj, kiuj estas priplorintaj la viktimojn, kiuj bone sciis kial...

CHARLES DICKENS (1812-1870).
(*Kristnaskaj Rakontoj*).

SUBTENO POR NIA REVUO.

John Théry, 10. —; Piet, 20. —; Leo, 4. —; Jan, 10. —; Mikke kaj Mart, 10. —; Djang, 5. —; monkollekto dum pulĉinela vespero, 230. —; entute : 289. — frankoj.

FLANDRA ARTO.



Malnova strateto en Mehleno.
Plumdesegnaĵo de Constant Lamineur.

INTER NI

El Sta. Nikolao. — Al Triumfo. — La vizito de S-oj Schoofs kaj Petiau tute klarigis la atmosferon. La membroj, kiuj ĉeestis la de Belga Ligo kunvokitan kunvenon esprimis sian plenan konfidon je la nuna estraro kaj apogis unuanime la vidpunkton de sia sekretario. Ankaŭ la membroj, kiuj ne ĉeestis tiun memorindan kunvenon, faris tion kaj aplaudis s-ron Van Ghendt post klarigo de lia sintenado. Unuanime oni decidis, ke “Al Triumfo” ekzistos kiel sendependa grupo. S-ro Verbruggen ektuŝis ankoraŭ kelkajn punktojn, kiuj estos klarigataj dum la sekvonta jarkunveno: partopreno al kongresoj, centra organizaĵo, k. t. p.

El Ronse. — La Paca Stelo. — Ni havas la plezuron informi pri la programo de Aprilo: la 2an. okazos kantvespero, dum kiu 2 novaj kantoj estos lernataj; s-ro Schietecatte akompanos per fortepiano; — la 9an. okazos perfektiga kurso pri “Komerca korespondado”; — la 16 an. okazos ripeta leciono kun ekzercoj kaj ekzemploj pri la participoj aktivaj kaj pasivaj; la 23an. nia grupano s-ro Marius Geenens faros interesplenan paroladon pri la “Vivo de Zamenhof”.

La 13an. de Aprilo “La Paca Stelo” ekskursos per speciala aŭtobuso al Roubaix, kie ni vizitos la tiean samideanaron. Tre verŝajne Lille-ajn Zamenhofanojn ni tie renkontos por interkonatiĝo. Aliĝu kiel eble plej baldaŭ ĉar la lokaj aŭtobusoj estas limigataj. La estraro nepre kalkulas je granda partopreno.

El Kortrijk. — Esperantista Grupo. — La konsilantaro de nia urbo voĉdonis 1.000 frankojn da subteno por senpagaj popolkursoj organizitaj de la loka esperantista grupo kaj kiujn gvidis ĉi tiun vintron S-oj Debrouwere kaj Génin; krom tio ĝi ankaŭ senpage metis je dispono de la grupo, kursejon en la urbdomo.

Same la pasintan jaron estis voĉdonita 760 da frankoj.

Estas ne dubinde, ke, se ĉiuj komunumoj tiel garantius la financon flankon, kursoj ekflorus tuj ĉie, je plej granda bono de la Esperantista movado.

El Antverpeno. — La rekta Vojo. — La maskobalo, okazinta en la ornamita salono de la “Grand Café des Billards” sabaton la 15an. de Marto, estis sukceso laŭ ĉiuj vidpunktoj. Estis svarmado de gemaskituloj kaj negemaskituloj, bruado de dancmuziko kaj ĝojaj homvoĉoj kaj ĝenerala plendado kiam la horo de fermo kaj hejmenreiro estis alveninta.

Flandrema Grupo Esperantista. — La 16an. de Marto okazis reprezentado de “Peĉjo en l' Infero”, kontraŭmilitema satiro en 3 aktoj. La salono de nia sidejo “Pannenhuis” estis plenplena; inter la ĉeestantaro estis multaj membroj el aliaj invititaj grupoj; el Hoboken, Liero, Mehleno, Sta. Nikolao kaj eĉ Aalst kelkaj samideanoj ĉeestis.

La reprezentado de la "Pax"-artistoj plaĉis al ĉiuj kaj la pulĉineloj estis ofte aplaŭdataj dum la ludo; precipe la esperantisto el ili akiris multe da sukceso.

Monkolekto dum paŭzo estis farata post alvoko de Jan Van Schoor kaj 230.— fr. kolektataj por "Flandra Esperantisto"! Krom tio ĉiuj alportitaj ekzempleroj de "Ĉe l' Flandra Izero" estis vendataj.

Laŭ propaganda vidpunkto tiu vespero estis senegala, ĉu ne, ali-grupaj samideanoj? Kiam vi ree vizitos nin? Estis tiel agrable en tiu "rondo familia!"

MART.

Esperanto door Zelfonderricht.

NEGENDE LES.

Vertalingen der achtste les.

Traduko. — Mi ne povas diri la nomon de tiu homo, ĉar mi ne konas lin. Mi ne estis en Parizo, sed en Londono. Kunprenu pluv-ombrelon, ĉar pluvos. Tuj kiam mi ricevos novaĵon, mi ĝin sciigos al vi. Mi ne scias, ĉu ŝi estas hejme. Parolu pli laŭte, por ke mi povu kompreni vin. Atendu ĝis kiam mi revenas. Mi ne scias kial li faris ĉi tion. Estis tiel malhele, ke ni nenion kapablis vidi. La unuj laboras, dum la aliaj faras nenion. Mi iros kun vi, se vi deziras. Antverpeno baldaŭ posedos unu rimarkindan konstruaĵon pli. Mi vivas kun li en bona amikeco. La buĉisto el nia strato vendas nur ĉevalaĵon.

Vertaling. — Ik zal vandaag thuis blijven want het regent. Ik zou heel gaarne komen, maar ik heb geen tijd. Het was zeer goed weder, toen wij te Lier aankwamen. Wij weten niet of hij hier is. Zoodra ik mijn werk geëindigd had, begon ik te lezen. Niettegenstaande allerhande moeilijkheden zullen wij volhouden. Het dooden van een mensch is een heldendaad in een oorlog; zóo zegt men ten minste. Alhoewel ik niet rijk ben, zal ik helpen naar mijn kunnen. Gisteren ontmoette ik u, maar gij zaagt mij niet. Eerlijkheid vóor alles! De jeugd van den geest is eeuwig en de eeuwigheid is de jeugd. Welke kinderstreek! De hoogte van dezen berg is niet groot. Dat boek is geen lektuur voor kinderen.

— De *samengestelde tijden* worden gevormd door het hulpwerkwoord *esti* + het bedrijvend of lijdend deelwoord, naar gelang het onderwerp de handeling doet of ondergaat.

— Het tegenwoordig bedrijvend deelwoord wordt gevormd door *anta*; het verleden door *inta*; het toekomstig door *onta*.

— Het tegenwoordig lijdend deelwoord wordt gevormd door *ata*; het verleden door *ita*; het toekomstig door *ota*.

— Het voorzetsel *door* achter het lijdend deelwoord wordt steeds vertaald door *de*.

Voorbeelden: mi estas amanta, ik ben beminnende = ik bemin; mi estas amata, ik word bemind; mi estis amata, ik werd bemind; li estus amata, hij zou bemind worden; enz.

La fiŝo estas kaptata de la fiŝkaptisto, de visch wordt door den vischer gevangen; ŝatata de ĉiuj, door allen bemind.

Vertaal. — De leerlingen worden door hun schoolhoofd geprezen. Gij wordt door uwe moeder bemind. Ik wist niet, dat de brief aangekomen was. Dat artikel is door mij geschreven, ik schaam er mij niet om. Integendeel, ik ben fier daarover. De politiemán, die den dief knipte, die mijn zakuurwerk gestolen had, kreeg van mij een kleine belooning. Ik zou naar het feest gekomen zijn, maar ik kon heelemaal niet: een zware ziekte verplichtte mij te bed te blijven. De leerlingen zouden door hun leeraar geprezen geworden zijn, indien zij hun vertalingen zonder fouten hadden gemaakt. Ik ben bezig met een vertaling van Tony's "Ernest Staes". De Engelschen hebben zich verrijkt door den handel. Is het waar, dat U deze brief geschreven hebt?

Woordenlijst. — Artikel, artikolo; zich schamen, honti; fier zijn, fieri; stelen, ŝteli; knippen, kapti; belooning, rekompenco; zwaar, grava; prijzen, laŭdi; fout, eraro; Engelschman, Anglo; zich verrijken, pliriĉigi sin; handel, komerco.

Traduku. — Tiu domo estas konstruata de konata arĥitekturisto; la konstruo estos finita nur post kvar monatoj. Por ekpozicio oni konstruas multajn belajn palacojn, sed la plej multaj el ili oni malkonstruas post la fermo de la ekpozicio. Fluanta akvo estas pli pura ol akvo staranta senmove. Viaj leteroj estas ĉiam skribitaj tute nelegeble. Mono havata estas pli grava ol mono havita. Mi ne farus la eraron, se li estus dirinta al mi la veron.

Woordenlijst. — Ekspozicio, tentoonstelling; palaco, paleis; movo, beweging; eraro, vergissing; vero, waarheid.

BIBLIOGRAFIO.

(Ni recenzas duope senditajn verkojn, unuopajn ni citas.
Ĉiu verko estas havebla ĉe Flandra Esperanto-Instituto.)

RICEVITAJ REVUOJ.

Aŭroro, porblindula revuo; Barcelona Stelo, 14; Brazila Esperantisto, 7-12; Breiz Atao, 88, 89, 90, 91, 92; British Esperantist, 299; Dordrechta Esperantisto, 14; Fluganta Skribilo, 2; Hinda Esperantisto, 2; Holanda Esperantisto, 102, 103, 104; Informoj de E. A. E., 96; International Language, 7; Katolika Espero, 75, 76; Laborista Esperantisto, 3; Litova Esperanto-Revuo, 2-3; Marto, 2; La Movado, 129, 130; Oficiala Bulteno de la Esp. Akademio, 2; Ondo de Daŭgava, 2; Opwaarts, 6; La Progreso, 2; Sennaciulo, 282; Svenska Esperanto-Tidningen, 2; Unuigita Tuthomaro, 1, 2, 3; Utrechta Esperantisto, 1, 2.

Flandra Esperanto-Instituto

Gravinstraat, 32
BORGERHOUT-ANTWERPEN
Poŝtĉekkonto 2427.03

Presado - Eldonado - Librovendado

Propagando - Instruado.

Petu niajn prezojn !

ESPERANTISTEN !
BLINDENVRIENDEN !
ABONNEERT U

op het maandblad van het
Algemeen Blindenverbond
van Vlaanderen

29, Rijselsche baan, Antwerpen-West
Jaarlijksche bijdrage : 10, 30 of 100 frank.
Postcheck 195.224.

Helpt daadwerkelijk de
Vlaamsche blinden.

Ĉiu literaturema esperantisto devas
posedi la belegan poemaron

AMO KAJ POEZIO

de Jan van Schoor
kaj LA DU AMATINOJ

kun

LA KAPRICOJ DE MARIANO
de Alfred de Musset.

Tradukitaj de Jan van Schoor
kaj rekomendita de Esperantista
Literatura Asocio.

La prezo estas nur po 2 belgoj (send-
kostoj enkalkulitaj).

Ambaŭ verkojn mendu ĉe „Flandra
Esperantisto” aŭ ĉe „Flandra Espe-
ranto-Instituto”.

PAUL KUTSUKIAN.

Ĝenerala agento por la provincoj
Antverpeno, Okcident-kaj Orient-
Flandrujo de la aŭtomobiloj kaj
ŝarĝveturiloj

REO

Ĝenerala agento por la provinco
Antverpeno de la tirveturiloj

INTERNATIONAL

TELEFONOJ : 916.48 - 985.15

Laborejo kaj Ekspozicia salono :
BELGIËLEI 149, ANTWERPEN.

Algemeen Vlaamsch Huis

„MALPERTUUS”

S. POT - HANSEN

Frankrijklei, 8 - Antwerpen.

Bekend voor zijn extra dranken

o. m. Dortmunder, Spelterbräu,

Leeuwenbier.

HUIS DE LEY

Driekoningestraat, 43, Berchem.

De Ley & Verschueren

CITÉ

N^{os} 143-144-145-146-147-179-180-
208-209

Groote keus in Vrouw- Manstoffen

Zijde, Fluweel en Voeding.

Goed koud buffet Goede bediening.

Drukkerij E. SELE, Prinsesstraat, 11, Antwerpen.